# HEJS

JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO ★ FEDERACIO

REDAKTORO: Sro. J. M.ª SERRANO
Merceria, 7, 3.º - TARRAGONA (Hispanujo)

Nro. 50 - 1966



**Junulara Grupo en "S. Feliu de Codinas"**

*Foto. Sro. Carmelo Bello*

# CASAL VILAFRANCA ESPERANTO-GRUPO

Oni okazigas Esperanto-kurson marde kaj vendrede de la 8'30 ĝis la 9'30 vespere.

VILAFRANCA DEL PENEDES havas 14.000 loĝantojn kaj ĝi kuŝas apud la monto Sant Miquel kun eltrovitaj prahistoriaj tomboj. Je 16 kilometroj estas la bela marborda urbo Sitges kaj je la sama distanco oni trovas la industria Vilanova i La Geltru, banita per la Mediteranea maro.

Oni povas admiri en la ĉirkaŭajoj de Vilafranca la jenajn vidindaĵojn: Sant Marti Sarroca kun antikva preĝejo romanida kaj vizitinda kastelo de la jaro 1.400. Ankaŭ romanida preĝejoj en Moja (Olèrdola) kaj Sant Sebastiá dels Gorgs, kaj ravaj monumentoj en Foix kaj Castelvi de la Marca.

Krom la menciitaj mirindaĵoj oni preskaŭ devige devas viziti la Muzeon de la Vino, en la urbo Vilafranca, unika en la mondo; la Katedralon en kies kripto ekzistas Llimona skulptaĵo; la monumentojn al la Vino kaj al "Xiquets" (Homaj Turoj).

Ankaŭ plezure ni prezentas kelkajn el niaj membroj kun la propraj okupoj:

SOGAS.—Komerco de ruĝaj kaj blankaj vinoj en karafoj aŭ boteloj en specialaj skatoloj, laŭ deziroj. Str. Duque de la Victoria, 33. T. 70.

Carpentisto TORNER.—Mebloj kaj lignaĵoj por la domkostruado. Meĥanika laborado. Str. Ramón Freixas, 34.

Presisto VIVES.—Presejo kun la supersignitaj Esperanto - literoj. Str. Balmes, 8. T. 675.

Restoracio DOMINGO.—Inda pro la servo kaj bongustaj manĝaĵoj. Promenejo San Francisco, 13. T. 219.

Filatelisto PLANS.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. A. 1.

Aŭtomobiloj JOSEP PERELLO.— Ekskluziva agento de la aŭtomobiloj CITROEN kun meĥanika servo. Disdonisto de la pneŭmatikoj MICHELIN kaj PIRELLI. Str. Calvo Sotelo, 57. T. 463.

DRO. L. L. ZAMENHOF

Kreinto de Esperanto kaj prudenta kaj saĝa e

Kiam oni tralegas la ĝeneralan verkaron de Zamenhof, oni restas tute surprizita antaŭ la g da kaj diversa kapableco de l'kreinto de l'Espe to. Liaj klopodoj kaj senlaka laborado favore a internacia lingvo okupis lin dumvive kun la cel ri al la homaro ne nur la maturan frukton de si teligento, sed ankaŭ la moralan kodon por nia e ta agado por kiu li tiel atente kaj skrupule pr radis la grundon.

Ĉar lia genia kreaĵo estis ludonta en la m socian rolon, kiel eble plej bone kaj efike, li tris al ni per klaraj kaj lumaj ekzemploj la se tan vojon por la naturajn kaj la raciajn proced por la iompostioma enkonduko de la lingvo, seku bazo por ke ĝi atingu la necesan disvastiĝon ka plenan sukceson.

Sed tio kio estis la plej mirinda kaj kort estis lia speciala maniero por klarigi kaj eduk samideanojn rilate al la lingvaj problemoj kaj taŭgaj solvoj. En tiu aspekto Dro. Zamenhof est re majstro kompetenta kaj subtila profesoro k saĝaj konsiloj kaj lerta orientado faciligis la van konon de l'esperantistoj.

Konstante li ricevadis demandojn pri la f menta gramatiko, pri la kategorio kaj semantiko pri la korekta uzado de novaj lingvaj elementoj neologismoj. Kaj ĉiam kun granda pacienco, komp mo kaj patra amo, li donis la ĝustan respondon, adekvatan solvon, eĉ se la demando estis iom ma aŭ malbonintenca, kelkafoje, se necese, lia res do estis tre energia, lia admono severa por evi miskomprenon kaj stimuli aŭ skui la personan vo de la demandinto aŭ ebla demandonto.

Por la eternaj kritikemaj aŭ tuzuloj,kiel ajn eminentaj aŭaltaranĝaj ili estis, li subite reagis por ke ili nek venenigu la spiriton de la samideanaro nekandanĝerigu la evoluigon de nia m vado. Tio estas konstatebla unue, en la revuo"LA ESPERANTISTO" kaj poste en la "KRESTOMATIO";"LIN VAJ RESPONDOJ","ORIGINALA VERKARO" kaj LETEROJ D L.L.ZAMENHOF".

Kiel endukisto, lia persona kaj pedagogia influo sur la geesperantistaron estis algrade pozitiva kaj decidigema. Li deĵoradis kiel vera pr fesoro de sia anaro tutmonda kies bonon, feliĉon kaj sukceson li sincere deziradis. Unuvorte: Dro. Zamenhof ĉiam agis kiel kreinto de l'Esperanto kaj kiel amiko, gvidanto kaj eterna konsilanto de sia karega universala familio.

GLORON do, al kiu, tiel, bonkore,sufere, kaj sindoneme dediĉis sian tutan vivon al la bono de l'homaro, kaj GLORON ankaŭ al la malnovaj kaj novaj pioniroj de nia movado kiuj tenis kaj tenas alte la torĉon de l'esperantismo.

<u>Prof. Jaime Aragay Pujol</u>

---

INTERNACIAJ SEMINAROJ
DE GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

Daŭrigante sian tradicion Gernana Esperanto-Junulara okasigos sian jubile(et)an 10an INTERNACIAN SEMINARION de la 27-12-66 ĝis la 3-1- en la urbo Münster.La 10a Internacia Seminario Tr tos la temon: <u>"LA MONDPERCEPTO DE LA MODERNAJ NATURSCIENCOJ"</u>. Tiu ĉi seminario estos la unua en serio de 6 seminarioj pri la kadra temo "Esencaj trajtoj de la hodiaŭa mondo" diskutota el jenaj vidpuntoj: natursciencoj (66/67), filozofio-relig (67/68),sociaj sciencoj (68/69),kulturo(69/70), edukado (70/71)kaj tekniko (71/72).

"PLEJ BONA AMIKO"

De naskiĝo ĝis forpaso la vivo estas regata de du naturaj leĝoj, kiujn oni plenumadas instinkte por propra konserviĝo. La unua temas pri nutrado de la korpo; la dua pri speca reprodukto. Sed sur kampo homa strikta plenumo de tiuj du esencaj vivoleĝoj ne sufiĉas por kvalifiki sin racia estaĵo, ĉar raciulo neniel povas kontentiĝi per nura instrikta agado. Oni razonas pri faktoj; oni havas sentojn, pensojn kaj ideojn, kiuj oni ne povas silentadi; nepre oni devas komunikadi ilin al ceteraj raciuloj, kiuj siavice priparolas siajn, Guste ĉitie, en tiu reciproka interŝanĝado de pensoj, sentoj kaj ideoj, kuŝas tiu ne rezistebla bezono eterne puŝanta la homon al serĉado de socia medio harmonie akordiĝanta al ties temperamento kaj vivokoncepto. Kvankam ĉiu individuo estas tute aparta mondo rilate gustoj, deziroj, pensmaniero kaj vivkoncepto, tamen neniu ŝatas nek povas longe vivadi en kompleta izoleco, ĉar silentadi ideon aŭ senton ja estas plej grava puno, kiun oni povas ricevi en nia larmoplena mondo.

La vivo homa estas kvazaŭ ŝtuparo, kies ŝtupo oni povas nomi vivofazetoj aŭ periodoj jene: infana, junula, plenkreska, mezaĝa kaj maljuna; (tiu lasta neniel signifas aŭ dependas de la jaroj, sed de la sano korpa kaj spirita). Ĉiu el tiuj vivofazetoj postulas sian apartan plenumendan taskon, kies konsisto estas la nepra antaŭpreparo por surgrimo de plua ŝtupo. Oni ne povas preterlasi ŝtupo, transirante del infana al plenkreska, nek reveni al pli malalta, sekve kiu misuzas vivoperiodon, spitante la koncernan leĝon rilate antaŭ preparado, tiu (nepre kaj en ĉiu momento) kron senti sin trenata de la vivocirkonstancoj al fiasko de siaj deziroj, ankaŭ li-ŝi ricevos pli-malpli frue la merititan premion pagendan ne per mono, sed per suferado fizika kaj morala. Oni ne rajtas neglekti, ke ĉiu nepre devas plugadi siajn vivovojon kaj forĝadi sian sorton, perla-

borante la koncernan subtenon.

La junula vivetapo estas la plej danĝera,ĉar en tiu aĝo oni eniras la socian vivon sen ia sperto kaj fantazioplene,puŝante nur de la vivoforto al memstara agado, taksante sin la plej supera,la ĉion pova, la ĉion scia,pro kio oni surdas antaŭ konsloj venantaj el kiu ajn,eĉ de la koncernaj gapatroj;precize en tiu vivoperiodo,kiam pli ol neniam oni bezonas firman kaj lojalan gvidan manon,kiu bone helpu en la elekto de vivovojon kaj vivrimedoj,kiun oni nepre devas fari en labirinto kia nia socia mondo plenplena je ŝanĝoj kaj allogaj kaptiloj ruze disponigataj por facile kaptado de facilanimuloj kaj najvaj senspertuloj.Kompreneble oni ne pretendas,ke juna homo sin-tenadu ĉiam seriozmiene kaj brovosulke kvazaŭ edziĝinto zorgoplena por subtenado de sia multnombra idaro. Male,oni ĝuado la vivon laŭ eble kaj akorde al la aĝo,sed oni ne forgesu samtempe sin prepari por la tuj sekvonta vivoperiodo,kiu sin prezentos neatende fulmorapide.

El tiu realeca skemo pri la vivo,kiun ĵus mi prezentis,elkroĉiĝas la konvinko pri kiom malfacile estas plugata al si vivovojon kontentigan,fridante la sorton al nura hazardo.Tiuokaze la tutan vivon oni senĉese nazfrapadas kontraŭ malfacilaĵoj,transsaltante de fiasko al fiasko,travivante nuraj elleriĝojn kaj seniluziojn,trovante nur larmojn kaj doloron kie oni atendis renkonti ridojn kaj feliĉon.

Antaŭ la perspektivo ke vivosperto estas nepre necesa sur ĉiu kampo de la homa aktivo,kaj ke ĝi estas akirebla nur per propra nasfrapado aŭ perla nasfrapado de niaj antaŭloj,ĉu ne prefere akiradi ĝin tra la libroj? Saĝa homo dirus jes!Ĉar dum unu tago helpe de libro oni akiras pli da sperto ol oni povas akiradi per centjara aktiva vivado.Sekve la plej bona, la plej fidela,lojala kaj seninteresa amiko de la homo estas la libro. Ĝi pacience sidadas en librobreto ĉiam kaj kaj en ĉiu momento preta konsili plej

ĝustan solvon pri kiu ajn problemo ,forpeladi tedon, enuon, prenante ĉiuokaze sintenon akorde al la humoro de la leganto.Neniam ĝi trompas nek ruzas nek fingrosignalas falsan vojon kiel veran same tiel,kiel ofte okazasen la nuna (oni povus diri putriĝinta) socia mondo.Jes,kara leginto-ino;kiu enamiĝas al la libroj kaj tralegas ilin atente,klpodante kompreni kiom celas iliaj tekstoj,tiu krom surpaŝadi rozkoloran vivovojon,aliigante nian larmoplenan mondon en perfekta paradiza ĝardeno,ankaŭ ĉe la fino li ricevos rekompnnce plenan kontentigon pri si mem,kio ja estas plej alta honoro.

A. Criach

% % % % % % % % % % % % % % % % % %

## 7-a BARCELONA PROVINCA RENKONTIGO DE ESPERANTO

## S.Feliu de Codinas.- 16a de oktobro.

Pro la granda amaso de esperantistoj kiuj renkontiĝis en S. Feliu de Codinas okaze de la 7ªB.P.R. de Esperanto,ni povas certigi ke tiu aranĝo atingis veran sukceson,pro multaj faktoj:bona organizado taŭgaj ejoj,diligentaj organizantoj de la urbo mem kaj de Sabadell,varma kaj brilanta tago,kaj fine la ĉeestado de nia tre kara HEF-Prezidanta Moŝto D-ro. Miguel Sancho Izquierdo kiu pere de sia elokventa parolo kortuŝis nin okaze la inaŭguro de strato L. Zamenhof.

La programo vere interesis la esperantistojn ek de la unuaj aranĝoj;meritas mencii la jenajn partojn: Inaŭguro str. Zamenhof kaj "donaco" al Sro. N.Ullar nome de la esperantistoj,prezentado de diapozitivoj kaj komentario pri la UEA Kongreso en Budapest,koncerto de sardanoj,frata kunmaĝado,deklamado de poeziaĵoj,Meso kaj prediko celebrita de pastro J.Claramunt.

Rezume,ni travivis mirindan tagon kune kun niaj samideanoj kaj ni senpacience atendas alian similan aranĝon.

Soleloj

## [illegible] JU[illegible] [illegible] JO[illegible]TISTA HEJS

### Monistrol de Montserrat (Barcelono)

MEMBROJ PROTEKTANTAJ

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Sroj.... | F. Callau | Barcelono . . . | 5.000 | ptoj. |
| " | S. Alberich | Barcelono . . . | 5.000 | " |
| " | Du Volontuloj | Barcelono . . . | 5.000 | " |
| " | Dro. M. Solá | Barcelona . . . | 5.000 | " |

Nome de la estraro mi kore dankas ĉiuj HEJS MEMBROJ PROTEKTANTAJ ilian kunlaboradon. Ni certigas al ili ke ilia helpo estos plene profita por nia junulara sekcio kaj esperantista movado.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Iom post iom la esperantistaro,komprenante la gravecon de nia entrepreno fidis en HEJS kaj pr tis al ĝi la sufiĉan financan helpon,por komenci la konstruaĉon de nia Restadejo. Eble kiam vi kara le-ganto,legas ĉi liniojn,jam la masonisto finis,unu el la du salonoj kiujn enhavos la unua parto de la domo.Tamen nun ekas novan problemon.

Oni devas translokigi al nia Restadejo multajn aferojn nome: tabloj,seĝoj,kuiriloj,telerojn, bibliotekoj,tablo por ludi tabloteniso,libroj,revu-oj,litoj ŝrankoj ktp.ktp. Pro tio urĝe ni necesas volontulon kiu estus preta pere de propra aŭtomobilo kumporti ĉiujn la menciitajn aferojn de Barcelono ĝis Monistrol ,dum diversaj festotagoj aŭ sabato

Atendante ke ĉi novan peton estos bone akce tita de ĉiuj, ni atentigas al vi kata volontulo komuniki vian proponon al S-ro. S. Aragay Str. Arce 8-2-4 Cornella aŭ aliaj HEJS- estraranoj.
Antaŭdankon.

HEJS-ESTRARO

## LETEROJ AL LA REDAKCIO

Al
Esperanto junulara Sekci
Hispanio

Sofio, 1966

Estimataj amikoj,

Bulgaraj turistoj-esperantistoj estas tre ĝojaj ke vi iniciatis kaj efectivigas la starigon de restadejo "Esperanto" en Hispanio.Tio estas kuraĝa iniciato, kiu meritas ĉies apogon. Ni estas kontentaj ke la konstruado de montodomo "Esperanto konvinkis vin imiti nian ekzemplon. Estus tre bone se niaj du restadejoj ĝemeliĝos. Verŝajne, iu el ni vizitos la restadejon okaze la 53-a U.K. de Esperanto.

Bulgaraj turistoj-esperantistoj bedaŭras ke ni estas tiom malproksime kio malhelpas nian personan partoprenon en la konstruado de la restadejo. Ankaŭ pro valutaj baroj ne estas ebla finance kontribui. Se vi aranĝos bibliotekon en via restadejo ni povas provizi ĝin per bulgaraj verkoj aperintaj en esperanto. En nia montodoma biblioteko ni posedas la libreton "Hispanio por vi"; ĝi ofte ridigas la vizitantoj de la esperantista montodomo.

Ni deziras al vi fruktodonan laboron.

Prezidanto de Turista Sekcio "Esperanto"

N.NIKOLOV:

Por la montodoma kolekto ni deziras ricevi esperanto-insignojn kaj glumarkojn;ĝu iu el vi volas riĉigi nian kolekton? Ni rekompencos.

Turista Sekcio "Esperanro"
P.K. 36, SOFIA,Bulgario.

# " E L R E V I G O "

Mi ne scias je kioma horo, ĉar mi estas tre juna kaj ankoraŭ me ne scipovas pri la horloĝo. Sed estis matene, kiam mi vekiĝis kaj miaj gepatroj tre kvistaj kuŝis ankoraŭ en la lito kaj mi kredis ilin ankoraŭ dormantaj malgraŭ la sunradioj ŝtelenirintaj tra fendetoj de la fenestra kurteno hela lumigis la tutan ĉambron. Interna jukado iom ĝenis min. Sed verŝajne tiu jukado ĝe la mateno post longa kaj trankvila dormado je estas tute normale al homo ĝuanta perfektan sanostaton kia tiu de mi .Komprenebl ĝi estas nura promalpleno-plendado de la estomako, kies unika rimedo estas nutraĵo. Sed ĉar mi volas konduti saĝe kaj fariĝi komprenema homo, do por iel pesigi la tempon kaj distritiun malagrablan ĝenon mi senbrue ekludis per la mano kaj piedoj en la konvinko, ke baldaŭ panjo vekiĝos kaj ŝi tuj prizorgos mian matenan banon kaj manĝon. Subite mi aŭdas la patran voĉon, kiu flustre parolas al patrino jene: Nu, mia kara; mi treege scivolas pri via decido rilate la propono, kiun mi faris al vi hieraŭ en la vespero antaŭ la enlitiĝo. Vi jam scias kiom necesas por la bona el volviĝado de la Junula Esperanto Sekcio, ke mi persone partoprenadu ĝiajn aranĝojn okazontajn en la kadro de la 27a H.E.K. okazonta ĉi jare en la mondfama metalurgia Bilbao. Nepre mi devos veturi tien kaj strevadi kiel eble antaŭen nian aferon. Ankaŭ vi scias kiom malagrabla estas al mi partopreni kongreson sen via akompano;sekve mi esperas, ke la kuŝeno dumnokte bone konsilis vin kaj nun vi povos doni al mi konkretan respondon tiurilate.Cetere nia kara ideto veturos tute komforte,ĉar li kuŝados sur la infanĉareto, [illegible] sidos en angulo de la vagono. Kaj en [illegible] ni klopodos atingi trankvilan kaj familiaran gastejon laŭmezure de Konveno.

Mem oni povas imagi al si kiom vigle mi altklinadis la orelojn por kapti bone la respondon de panjo...

al tiu parolado de paĉjo,ĉar mi ne bone konciis ke el tiu respondo dependis mia unua granda aventuro, nome; sperti per la unua fojo veran esperantujan etoson preskaŭ dum tuta semajno, aŭdante grandajn diskutojn en esperanto.

Ĉar kiel supre dirite mi estas ankoraŭ treege juna,tamen jam longe mi sciiĝis pri tiu lingvo,per kiu oni forpelados la lingvobarilojn,kiuj spirite disigadas la homaron,malhelpante samtempe la tutmondan homfratiĝon, tiom multe prikantata de ĉiu institucio el kiu ajn lando sur la terŝelo.

Jes, ekde mia naskiĝo mi multe aŭdis la belan kaj harmonian muzicadon de la internacia lingvo kaj ankaŭ perfekte mi distingas ĉu la prononcado estas korekta laŭ universala unueco aŭ ĉu ĝi estas fuŝa, malkovrante la regionon aŭ lando-devenon de la parolinto.Ĝuste pro tio mi tiom multe sopiradas ĉeesti esperanto-kongreson por ricevi veran praktikan lecionon pri korekta uzado de la lingvo kaj kontroli ĉu ĉiu partoprenanto rigardas ĝin kiel idiomo, do sen troa atento,aŭ ĉu oni trektas ĝinlaŭ ĝia vera senso kaj signifo de la lingvo tutmonda, kiun volis donadi al ĝi ĝia genia kreinto L.Zamenhof.

Tial ke la respondo de panjo estis jesa al la deziroj de paĉjo,do de tiu ĉi momento mia fantazio alte ekrevadis la ĝuon travivadi plurajn sinsekvajn tagojn en vera esperantista etoso.

Ĉio iradis laŭ antaŭplanis paĉjo kaj survoje al Bilbao mi spertis neniun ĝenon,kaj en la vagono ĉe la ekveturo mi jam ekaŭdis la internacian lingvon, ĉar aliaj ges-anoj samcele kunveturadis kaj ili tuj ekbabiladis en esperanto tiel por propagandi ĝin survoje,kiel por senrustigadi la buŝajn kordojn, kiun ne tro libere moviĝis ĉe la komenco.

En Zaragoza novaj aragonaj ges-anoj envenis la vagonon,pro kio nia eta esperantujo pli larĝiĝis, vekante scivolemon de la ceteraj vojaĝantoj,fremdaj al nia afero.

Dum la kongreso miaj oreloj ricevis la unuan baton, kaj mi devis streĉe akrigi la aŭdon por malkovri la kaŭzon; kelkaj esperantistoj misprononcas kelkajn literojn kaj tiu misprononzado ne nur fuŝas la tuton harmonion de la internacia lingvo, sed ankaŭ tiun universalan unuecon, kiun ĝi bezonas por fariĝi tutmonda laŭ la volo de Dro. Zamenhof.

Ĉu tio volas signifi ke ili ne kapablas elbuŝigi tiujn sonojn laŭ lingva fundamento? Ne; absolute ne! Tio evidentiĝas gravan neglekton fare de la kursgvidantoj kiuj ĉe la unuaj lecionoj malatentas tiun gravan punkton de la lingvo, kiu pli malfrue povos estiĝadi miskomprenon en la parola uzado de la lingvo inter malsamlandanoj.

Mi povus ankoraŭ longe argumenti pri tiu-ĉi temo, prezentante amason da ekzemploj pri miskompreno kaŭze de litera misprononcado, sed mi ne faros ĉar mi havas la esperon ke la gesanoj priatentos la aferon almenaŭ por ne senkrediti la hispanan esperanto movadon antaŭ la Universala Krongreso en Madrid ka jaro 1968a.

Karĉjo Yagara

=.=..=.=.=.=.=.=.=.=.=.=.==

DEZIRAS KORESPONDI . . .

18 jara studento fortepianisto linvokono (korespondi pri ĉiuj temoj krom filateio)

S-ro. Lorne Bergson
50 Wigan Crescent
DOWNSVIEW, ONTARIO
Canada

H.E.J.S. - DELEGACION BARCELONA

Casanova 57-6-7ª Jueves y Sábados de 7,30 a 9,30 hor
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Una de las actividades más amenas e interesantes que nos hemos propuesto organizar ha sido el departamento musical, el cual sirva de enseñanza musical y a la vez de entretenimiento. Con este fin varios consocios han aportado para el mencionado departamento una radio, tocadiscos,12 discos de música moderna y clásica, elementos que ya se han utilizado en varias ocasiones, pero si se desea poseer un "DEPARTAMENTO MUSICAL" adecuado se necesitan muchos más discos, no importa su estilo, época, o tema por ejemplo ópera, zarzuela, sinfónico,instrumental, solista, ballet, opereta, bailables, ye-ye, jaz.De esta forma podrían preparar audiciones de muy variados temas y auditores, lográndose una actividad en este campo insitado.

Bien sabe esta junta el coste elevado de los discos y microsurcos, por ello no deseamos que sean donados al departamento musical, sino solamente prestados para lasaudiciones realizadas en nuestro local social, una vez utilizados serían devueltos personalmente a los propietarios.

Rogámos pues que los simpatizantes y socios de nuestra delegación deseosos de colaborar en esta nueva inquietud, se personen en nuestro local para concretar qué discos o colecciones de ellos pueden prestarnos.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## CURSOS DE ESPERANTO

A petición de varios socios se ha ampliado en este período de enseñanza los cursos del idioma internacional, realizándose de momento cursos superiores y elementales cada jueves y sábados de 8 a 9 horas a cargo de los Sres. Prof. Jaime Aragay y J. Vélez y S. Aragay.

Pudiendose inscribirse en ellos todos los esperantistas y público en general que lo desee,pues nuestra intención es difundir ampliamente el Espera

Asimismo deseando la junta ampliar el n
ro de cursos elementales, rogamos a cuantos pro
res deseen colaborar con nuestra delegación se
gan en contacto con nosotros, pues nuestro dese
ferviente es ampliar y mejorar la difusión del
ranto entre todos los ciudadanos, para que en u
turo próximo con ocasión del Congreso Universal
Esperanto en Madrid y en el Internacional Juven
TEJO en Tarragona, nuestros esperantistas posea
nivel cultural lingüistico a tono con los menci
dos congresos

La junta

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

15 DE DICIEMBRE DIA DEL LIBRO

ENTRE LOS ESPERANTISTAS DEL MUNDO

El próximo día 15 de diciembre se conmemor
los ambientes esperantistas nuestro día del lib
Nuestra modesta delegación lamentablemente no p
ofrecer a los socios una muestra abundante de l
obras más importantes editadas en estos últimos
pero está dispuesta a complacer cuantas peticio
le sean fórmuladas, saí pues rogamos que cuanto
seen poseer en la fecha mencionada alguna obra
no dispusieras en la biblioteca nos formulasen
dido lo más pronto posible.

Bibliotecario

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

NI DEZIRAS AL ĈIUJ NIAJ MEMBROJ KAJ LEGANTOJ

ĜOJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON

=.=.=.=.=.=.=.=.=

-Ĉu VI jam estas aboanto de la internacia ju
lara revuo KONTAKTO ?

Petu informojn al UEA-ĉefdelegito:
Sro. Ramón Molera, Sta. Joaquina 13
MOYA, (Barcelona)

---

Lignaĵoj CANET.—Por la servo de la konstruado. Str. Cort, 41. T. 306.

Apotekisto L. M.ª HERNANDEZ IZAL, en Sant Pau d'Ordal.—Je la servo de la bona sano en la regiono. A. 83 (Vilafranca del Penedès). T. 13.

Filatelisto BOLET.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. Placo Juan Alvarez, 35. T. 156. A. 14.

Presisto YSART.—Konstruado de skatoloj el kartono. Str. Oviedo, 5. T. 333.

Mebloj FELIU.—Sortimento por oficejoj, geedziĝoj kaj ĝeneralaj ornamaĵoj. Str. José Antonio, 19. T. 543.

Trinkejo SPORT.—Kafoj kaj malvarmtrinkaĵoj. Promenejo Nuestra Señora, 49. T. 718.

Vinagroj DURAN.—Aromigitaj el herboj, ellaborado el pura vino Str. Comercio, 36. T. 11.

GRAU.—Amatora fotografisto. Str. Benach, 4. T. 865.

ĈAMPANO, RAVENTOS CATASUS.—Aŭtentika kelo. Oni provizas kun etiketoj en Esperanto. Str. San Pedro, 8. T. 108.


Aŭtomobiloj S A N J O R (Renta-Car).—Taksimetroj. Luo sen ŝofero. Str. Amalia, 24. T. 580. J. Sogas Muntané.

SEGUI MÜLLER.—Advokato Filatelisto. Str. G. Cortijo, 22. T. 523.

CASAS.— Feraĵvendejo-Kristaloj-Vitrojkaj materialoj por la konstruado. Str. Ferrers, 3. T. 42.

GIRALT.—Pentristo de aŭtomobiloj. Av. Tarragona, 40. T. 459. - Kaj Str. Amalia, 85. T. 385.

SANS Bicikloj kaj motorcikloj. — Ĉiuj specoj por geinfanoj kaj plenkreskuloj. La eksterordinara motorciklo OSSA, la plej moderna por sportadi Modernaj TURNILOJ por la konstruado de industriaj aferoj, laŭ deziro Str. Tarragona, 16. A. 118. T. 458.



MADERAS CALLAU

Sans, 302 - Teléf. 239 05 24

BARCELONA (14)

jovani

restauración
reparación

s, futbolines, billares,
billarin

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA
y
TEJEDORA
ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Teléf. 230 29 41
BARCELONA

VENDO RETALES

J. Cardellach

C. Salvatierra, 99
TARRASA